



## KURSOJ kaj renkontoj – COURS et rencontres

Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,  
1201, Genève (derrière le collège Voltaire)  
Tél: 022 339 05 00 – Fax : 022 339 05 09

E-mail : [info@upcge.ch](mailto:info@upcge.ch) – Site Internet : [www.upcge.ch](http://www.upcge.ch)

Jara kotizo : CHF 50.00 Kursoj : po SFr. 50.00 por unu kurso (semestre)

Loko: Ecole de Commerce de Genève, Nicolas-Bouvier, rue de Saint-Jean 60,  
CH-1203 Genève, Tel.: 022 546 22 00.

La unua semestro okazas de la 6-a de oktobro 2014 ĝis la 5-a de februaro  
2015. Aliĝoj ĉe Université Populaire du Canton de Genève, 23 rue du Vuache,  
1201 Genève (malantaŭ/derrière Collège Voltaire)

Nivelo I, marde de 18h00 ĝis 19h30

Nivelo II (gramatiko/konversacio), marde de 18h00 ĝis 19h30

Ĝeneva grupo : Esperanto-Grupo La Stelo, La Stelo 1200 Genève, Kontakto :  
[lastelo@gmail.com](mailto:lastelo@gmail.com) , retpaĝo : [La Stelo-Events/Facebook](https://www.facebook.com/LaSteloEvents/). La grupo kunvenas  
de tempo al tempo en la Maison des Associations, 15 rue des Savoises, 1205  
Genève.

JEGG – Junulara Esperanto Grupo de Ĝenevo

Renkontoj okazas unu aŭ du foje monate (merkredon aŭ jaŭdon) ĉe Green  
Café, 77 boulevard Carl Vogt, Plainpalais, Genève, je la 19-a horo. Por ricevi  
informojn, bonvolu aliĝi ĉe : <http://groups.google.com/group/jegg> aŭ sendi mesaĝon  
al : [junularagrupog@gmail.com](mailto:junularagrupog@gmail.com)

Laŭzana grupo : Laŭzana Esperanto Societo, Case postale 246 – CH-1000  
Lausanne 22. Tel. +41 21 647 29 28 Interete : [www.esperanto-lausanne.ch](http://www.esperanto-lausanne.ch),  
retadreso : [info@esperanto-lausanne.ch](mailto:info@esperanto-lausanne.ch)

Renkontoj ĉiun unuan lundon de la monato je la 20-horo en la Bufedo de la  
Stacidomo.

CDELI – La Chaux-de-Fonds

Didaktikaj stud-sabatoj : la trian sabaton de la monato (konfirminde) por ĉiuj  
esperanto-lernantoj.

Bonveno je la 10a horo, kursoj de la 10.30-a ĝis la 16.30-a.

Aliĝo : Nancy Fontannaz, telefone 021 728 31 27 au rete :  
[nancy.fontannaz@gmail.com](mailto:nancy.fontannaz@gmail.com)

Partopren-kotizo : CHF 15, senpage por studentoj kaj senlaboruloj.

Meztaga manĝo (ne inkluzivita) kune en najbara restoracio.

Adreso: CDELI, Bibliothèque de la Ville, Progrès 33, 2a etaĝo, CP 3034, 2303 La  
Chaux-de-Fonds. Tel: 032 967 68 42, retadreso : [gacond@bluewin.ch](mailto:gacond@bluewin.ch)

ANNECY, France

Annecy Esperanto

Responsable: Rolande HUDRY – 5 av. de Barral

74960 SEYNOD – Tél. 04 50 51 06 29

Les cours ont lieu le mercredi à partir de 16 h. – Salle Jumel – Quai des  
Clarisses (à côté de la Croix-Rouge).



**Asocio**  
**Espéranto - Genève - Régions**  
[www.esperanto-geneve-regions.info](http://www.esperanto-geneve-regions.info)

## LIMSALTANTA FOLIO

vintro-printempo : No. 9, 2014

La asocio Esperanto-Genève-Régions estas translima asocio kiu celas krei ligojn inter  
grupoj de Esperantistoj en Pays de Gex, Lago Lemano, Rodanalo kaj Ĝenevo, inter  
aliaj.

La Asocio organizas babilan rondon, La Lunda Grupo, ĉiun lundon ekde la 18-a  
horo ĉe "Galicia", rue des Gares, malantaŭ la stacidomo Cornavin en Ĝenevo (ĉe  
la angulo, vid-al-vide de la Poŝtoficejo Montbrillant).

En ĉi-tiu numero : *Asocia agado, verda angulo,,  
ŝercoj, fiŝoj, kaj aliaj interesajoj ...*

Por pli da informoj, vizitu nian retpaĝaron :

[www.esperanto-geneve-regions.info](http://www.esperanto-geneve-regions.info)

Il y a des pages en français! – There are pages in English!

aŭ kontaktu nin

telefone : Charmian +33 (0)450 422 802 retpoŝte : [charmian@aliceads.fr](mailto:charmian@aliceads.fr)

aŭ Marie +33 (0)450 421 956

kaj en Ĝenevo : Laure 0768614836

Poŝtadreso : 36 parc du Bugnon, 01630 St Genis-Pouilly, Francio

Konto (Svisa Poŝtobanko CCP) : 17-207679-3

Tiuj kiuj deziras, povas kontribui simbolan sumon al Asocio EGR de € 3.00 aŭ SFr 5.00 (jare) –  
donacoj ankaŭ bonvenas! Por membriĝi, nur demandu kaj vi ricevos membro-karton.

Landaj asocioj :

- **Svisa Esperanto-Societo** : [www.svisa-esperanto-societo.ch](http://www.svisa-esperanto-societo.ch)  
Kunprezidantoj: Mireille Grosjean, Grand-Rue 9, 2416 Les Brenets  
Tel: 032 932 18 88 retpoŝte : [mirejo.mireille@gmail.com](mailto:mirejo.mireille@gmail.com)  
Dietrich Weidmann, Archstr. 2, 8610 Uster, Tel: 044 251 50 25  
[info@esperanto.ch](mailto:info@esperanto.ch)

- **Espéranto-France**, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris  
[www.esperanto-france.org](http://www.esperanto-france.org) [info@esperanto-france.org](mailto:info@esperanto-france.org), Tel: 01 42 786 886

## La Bona Lingvo

La Bona Lingvo de Claude Piron haveblas interrete - jen la adreso :  
[http://www.esperanto.org.uk/eldonoj/piron/tekstoj/La\\_bona\\_lingvo.html](http://www.esperanto.org.uk/eldonoj/piron/tekstoj/La_bona_lingvo.html)

### Rimareto pri la utila vorto "je"

Kelkfoje ni dubas pri prepozicio;  
por frazon aranĝi, necesas ja io,  
sed ne temas pri **sur** (ĉar ne temas pri  
spaco),  
kaj **super** ne taŭgas (ĉar mankas  
surfaco),  
kaj **al** sonas strange, kaj **de** nelogike,  
kaj **pro** proskribinde, sed **kun** nur  
komike;  
ni gratas la kapon kaj siblas, "ho ve!"  
En tiaj okazoj nin helpas nur **je**.  
"Li estas tre riĉa **je** oro, juveloj."  
"Ŝi estas graveda, kaj eĉ **je** ĝemeloj."  
"Mi lin kredas krimulo, kapabla **je** ĉio."  
"Li estas bonul", sed ne kredas **je** Dio."  
"Li tenis la knabon **je** ties orelo."  
"**Je** la deka matene aperis anĝelo."  
Sed la vorton utilan modere ni uzu -  
kaj ne per **je**-ado cerbumi rifuzo,  
ĉar **je**, kiel **-um**, oni uzu ne vaste,  
kaj nur post pensado elektu plej juste.  
*Marjorie Boulton, Faktoj kaj Fantazioj*

- **Ĉi tie**, kie ni staras, en **tiu ĉi**  
muzeo, ni admiru memoraĵojn pri  
Esperanto.  
- Do vi vojaĝos al Parizo? Kiam vi  
iros **tien**?  
- Rigardu **tien**, **je** la alia flanko de  
la strato, ĉu vi vidas vestaĵ-  
butikon?  
- Kie estas mia libro?  
- **Tie**, sub la seĝo.  
- Venu **ĉi tien**, aĉa hundo! Ne  
ĉasu katojn!

**Je** kiu horo ni renkontiĝos  
morgaŭ?

**Je** la 10-a horo, ĉu vi konsentas?

Mi alvenis **je** la 18-a horo, kaj  
neniu ĉeestis - ĉu mi malfruis?

**Je** via sano!

**Ĉi tie, tie, kaj ĉie.**

Por vivi pli bonan vivon, necesas al mi,  
ke mia amorantino estu **ĉi tie** ....

**Ĉi tie**, plenumante ĉiun tagon de la jaro  
Ŝanĝante mian vivon per svingo de la  
mano

Neniul povas nei, ke ekzistas io **tie**

**Tie**, karesante per fingro ŝian hararon  
Ni ambaŭ pensante kiom bone povas esti  
lu parolas, sed ŝi ne scias ke li estas **tie**

Mi deziras ŝin **ĉie**, kaj se ŝi estas apud mi  
Mi scias ke mi neniam bezonas ĉagreniĝi  
Sed ami ŝin, estas bezoni ŝin **ĉie**  
Konsciante, ke amo nepre estas  
kunpartigebla

Ambaŭ kredante ke amo neniam mortas  
Observante ŝiajn okulojn,  
kaj esperante ke mi ĉiam estos **tie**

Mi deziras ŝin **ĉie** kaj se ŝi estas apud mi  
Mi scias ke mi neniam bezonas ĉagreniĝi  
Sed ami ŝin, estas bezoni ŝin **ĉie**

Konsciante, ke amo nepre estas  
kunpartigebla

Ambaŭ kredante ke amo neniam mortas  
Observante ŝiajn okulojn,  
kaj esperante ke mi ĉiam estos **tie**

Mi estos **tie**, kaj **ĉie**

**Ĉi tie, tie, kaj ĉie.**

"Here, there and everywhere", John  
Lennon, Paul McCartney

☞ Du rifuĝejoj el la mizeroj de la vivo ekzistas: muziko kaj katoj.

*Albert Schweizer*

## Verda angulo

**Ni povas ("Podemos")**: nova civitana partio en Hispanujo esperas konkretigi la altigon de civitana politiko post sukceso en la Eŭropa baloto.

Aĝa de apenaŭ cent tagoj, la hispana partio kiu naskiĝis de la movado de la indignuloj nun havas 5 membrojn ĉe la Eŭropa Parlamento (MEP-oj), kaj estas rezoluta ŝanĝi la politikan pejzaĝon.

Lastatempe, ŝajnis ke la Hispana movado de indignuloj forvelkis. Sed dimanĉon vespere (la 25-an de majo 2014), ida partio, naskita de ĝiaj cendroj, pruvis la malon - ĝi gajnis 5 seĝojn kaj 1.2 milionojn da voĉdonoj en la hispanaj Eŭropaj balotoj.

Ĝia estro estas Pablo Iglesias, 35-jaraĝa profesoro pri politika scienco kun harvosto: la partio Podemos (Ni Povas) ekaperis kiel la tria plej granda politika forto en pluraj hispanaj regionoj, inkluzive de Madrido.

"La ideo kiu regas la partion estas simpla", diris Iglesias, "estas politiko fare de civitanoj. Se civitanoj ne implicas sin en politiko, aliaj tion faros. Kaj tio malfermas la pordon al ŝtelo de via demokratio, viaj rajtoj kaj via monujo."

Tiu mild-parolanta, eksa membro de la Juneca Komunista Partio eble konsternis la analistojn pro la rezulto de sia partio, sed por li ne sufiĉas. La reganta Partio de la Popolo (PP) estas gajninta la balotojn, tio signifas pli da senlaboruloj, kaj elloĝigoj daŭrigos. "Ni volas konstrui politikan majoritaton kiu spegulas la socian majoritaton en Hispanujo."

La nobla listo de Podemos de voĉdonaj promesoj inkluzivas forigi impost-paradizojn, starigi minimuman enspezon kaj malaltigon de la emerit-aĝo ĝis 60 jaroj. La partio kondukis sian balot-kampanjon per minimuma buĝeto, utiliganta amas-financadon kaj ĉiean aperadon ĉe hispana televido por krei pligrandan impulson.

La hispanoj kiuj voĉdonis por Podemos estas lacigitaj pri longdaŭra senlaboro, rigorecaj rimedoj kaj skandaloj pri koruptado; Iglesias asertas ke la MEP-oj de Podemos agos laŭ tiu sento. Anstataŭ ricevi salajron de pli ol €8,000 monate, "eĉ ne unu el niaj MEP-oj enspezos pli ol €1,930, sumo kiu estas tri foje la minimuma salajro en Hispanujo." La resto estos donata, aŭ al la partio, aŭ al elektita bonfaraĵo.

"Ni ne vojaĝos al Bruselo per aferista klaso. Kaj se influgrupo aliros nin, ni publikos tiun informon." Unu el la unuaj punktoj de ilia task-listo estos proponi al aliaj MEP-oj fari la saman.

La sukceso de Podemos instigis multajn demandojn en la Hispanaj novaĵ-medioj pri la du majoritataj politikaj partioj. La PP kaj la Socialistoj kune ricevis malpli ol 50% de la voĉdonoj, granda diferenco kompare al la 81% de subteno kiun ili ricevis en 2009. La supera kandidato de PP, Miguel Arias Cañete, celebris sian venkon en la balotoj, sed agnoskis ke la rezultoj estis "grava atentigo" de voĉdonantoj.

La Socialistoj konstatis la plej malbonan balotad-rezulton - la ĉefo, Alfredo Pérez Rualcaba anoncis lundon ke li rezignas, aldonante: "Estas klare ke ni ne regajnis la fidelecon de la voĉdonantoj." La partio starigos konferencon fine de Julio por elekti novan ĉefon.

→ sekvo ĉe Paĝo 5

## Asocia agado

### La Lunda Grupo festas sian 12-an datrevenon !

Ĉiun lundon (preskaŭ !) ekde 12 jaroj, la Lunda Grupo kuniĝas en kafejo en Ĝenevo por babilo esperante. La grupo estis kreita por ĉiuj, kiuj volas paroli esperanton flue kaj senbremse : komencantoj, progresantoj, fakte ĉiuj kiuj estas babilemaj !

Ni decidis kunveni ĉiun semajnon, je la sama horo kaj en la sama loko - nuntempe Le Galicia, rue des Gares, je la 18-a horo - tiel estas pli facile scii kiam kaj kie alveni, la restoracio estas apud la stacidomo, do ankaŭ taŭgas por vizitantoj. Do ni kreas grandan bruaĉon ĉar la babilado iĝas foje laŭta - grandaj diskutoj okazas, ekzemple, pri ĝardenumo, kudrado, trikado, dorlot-bestoj, genealogio, politiko - eĉ pri gramatiko ! Bone por plivastigi la vortprovizon.

Estas simpla kaj agrabla aranĝo, ne bezonas multe da organizo - ni nur certigas laŭeble ke ĉeestas almenaŭ unu grupano. Kutime ni estas cirkaŭ 6, foje ĝis 10 aŭ 12. Se la restoracio estas fermita, ni foje organizas piknikon en la Botanika Ĝardeno, kiel ni faris por la Pentekosta Lundo - alia ĝoja renkontiĝo !

Kiam ni bezonas informi la grupanojn pri ŝanĝo, ni uzas du rimedojn : retmesaĝojn kaj nian retpaĝon - [http : //www.esperanto-geneve-regions.info](http://www.esperanto-geneve-regions.info). Laŭbezone, ni ankaŭ vokas telefone al tiuj, kiuj ne havas intereton.

Gratulojn al niaj grupanoj, kiuj fidele ĉeestas eĉ dum neĝo, pluvo, ŝtormo aŭ varmeĝo !

Charmian Common ☆

### La 7-a Jarkunveno de Ĉinaj E-komercistoj, en Suzhou (IKEF-Ĉina)

De la 2a ĝis la 3a de novembro, 2013 en Dongshahu Lernejo, solene okazis la 7a jarkunveno de IKEF-Ĉina, entreprenita de Suzhou-a Esperanto-Asocio kaj helpita de Dongshahu Lernejo. Tiu evento plene montris la novan ideon ke la buroo de eduko metas specialan atenton por pliiĝi la kontribuon de edukado al ekonomia disvolviĝo, kaj penas por havigi subtenon dum servado al la socio.

Sinjoro Huang Wenjun, vic-buroestro de buroo de ekonomio kaj komerco ĉeestis en la jarkunveno kaj faris varman parolon. Li rakontis al entreprenistoj ĉeestantaj la pozician superecon de Industria Parko de Singapuro, investan medion kaj esceptajn politikojn, kiujn faris la Ŝtata Konsilantaro por subteni la disvolviĝon de Industria Parko. Sinjoro Jiang Weiyi, oficestro de Suzhou-a Federacio de Socio kaj Scienco ankaŭ ĉeestis en la kunveno.

Partoprenis en la jarkunveno ne nur la entreprenistaj delegitoj de ĉinaj Esperanto-Asocioj el diversaj provincoj, sed ankaŭ la entreprenistaj delegitoj el Aŭstralio, Brazilo, Irano, Koreio kaj aliaj landoj. La ĉefa temo de tiu ĉi jarkunveno estis diskuti pri la grava funkcio de Esperanto en la ekonomia disvolviĝo kaj kiel plibone servi la ĉinan ekonomian disvolviĝon per Esperanto. **La brila punkto de tiu ĉi kunveno estis ke labor-lingvo estas Esperanto kaj dum tuta procezo troviĝas nek tradukisto nek interpretisto malgraŭ ĉeestantoj el diversaj landoj kun malsama gepatra lingvo.**

→ Sekvo ĉe Paĝo 4

## Plurlingva listo de konataj fiŝoj

esperanto	franca	angla	germana	latina
alburno	l'ablette	common bleak	der Ukelei	<i>Alburnus alburnus</i>
anĉovo	l'anchois	anchovy	die Sardelle	<i>Engraulis encrasicolus</i>
angilo	l'anguille	eel	der Aal	<i>Anguilla</i>
bramo	la dorade	bream (sea)	die Goldbrasse	<i>Abramis brama</i>
dornofiŝo	l'épinoche	stickleback	der Stichling	<i>Gasterosteus aculeatus</i>
eglefino	l'aiglefin	haddock	der Schellfisch	<i>Melanogrammus aeglefinus</i>
fokseno	le vairon	minnow	der Bitterfisch, die Pfrille	<i>Phoxinus phoxinus</i>
gobio	le goujon	gudgeon	der Gründling	<i>Gobio gobio</i>
haringo	le hareng	herring	der Hering	<i>Clupea</i>
karmo	la carpe	carp	der Karpfen	<i>Cyprinus carpio</i>
labrako	le bar	bass	der Barsch	<i>Perciformes</i>
lofio	la baudroie	monkfish	der Seeteufel	<i>Lophius piscatorius</i>
moruo	la morue, le cabillaud	cod	der Kabeljau, der Dorsch	<i>Gadus morhua</i>
orfiŝo	poisson rouge	goldfish	der Goldfisch	<i>Carassius auratus auratus</i>
perko	la perche	perch	der Flussbarsch, der Bürschling	<i>Perca fluviatilis</i>
plateso	la plie	plaice	die Scholle	<i>Pleuronectes platessa</i>
ploto	le gardon	roach	die Plötze, das Rotaugen	<i>Rutilus rutilus</i>
salmo	le saumon	salmon	der Lachs	<i>Salmonidae</i>
sardino	la sardine	sardine	die Sardine	<i>Sardina pilchardus</i>
siluro	la silure	catfish	der Wels, der Katzenfisch	<i>Siluris (Siluriformes)</i>
skombro	le maquereau	mackerel	die Makrele	<i>Scombridae</i>
soleo	la sole	sole	die Seezunge	<i>Solea solea</i>
sturgo	l'esturgeon	sturgeon	der Stör	<i>Acipenser</i>
tinko	la tanche	tench	die Schleie	<i>Tinca tinca</i>
tinuso	le thon	tuna	der Tunfisch	<i>Scombridae</i>
truto	la truite	trout	die Forelle	<i>Salmo trutta</i>

## Humuraĵoj

Konsiloj de avino al siaj genepoj:

- Por bone digesti, mi trinkas bieron,
  - Kiam apetito mankas, mi trinkas blankan vinon,
  - Por malalta sangopremo, ruĝan vinon,
  - Por alta sangopremo, konjakon,
  - Kaj kiam mi malvarmumiĝas, mi prenas brandon.
- > Sed, grand'panjo, kiam trinkas vi akvon?
- Mi ankoraŭ neniam suferis sufiĉe gravan malsaniĝon.

Edzo parolas dum la vespermanĝo :

"Mi tiel amas vin, kaj mi ne scias kiel mi povus vivi sen vi."

Mirante, la edzino demandas "Ĉu tio venas de vi aŭ ĉu estas la vino kiu igas vin paroli ?"

La edzo respondis: "Ne, ne, estas mi kiu parolis al la vino !"

\*KIAM AMO VELKIĜAS...

Hieraŭ nokte mi estis sidanta sur la kanapo, spektante la televidilon, kiam mi aŭdis la voĉon de mia edzino el la kuirejo :

"Kion vi ŝatus manĝi ĉi-vespere, karulo? Kokidon, bovaĵon aŭ ŝafidon ?"

Mi diris, "Mi ŝatus manĝi kokidon, karulino, dankon. "

Kaj ŝi respondis : "Vi manĝos supon, kotkapo. Mi parolis al la kato."

*Dankon al Paula*

- Joĉjo, vekigu. Estas jam malfrue kaj vi devas iri al la lernejo.

- Mi ne plu volas iri al la lernejo.

- Neeble, vi devas iri.

- Mi ne volas. La profesoroj malamas min, la gelernantoj ne volas alparoli min. Kial mi iru?

- Ĉar vi estas la direktoro.

*Fonto : Lernu!*

→ *Sekvo de Paĝo 2 , Asocia agado : IKEF-Ĉina*

Dum paŭzo, gastoj akompanataj de lernejestro Zhou Hong vizitis nian belegan lernejon Dongshahu Lernejo. Plie Sinjoro Zhou Hong Esperante prezentis la specialajn klerigejojn, kaj la ideojn por funkciigi la lernejon. Vizitantoj admiradis la lernejon pro tiel moderna eduk-aplikado kaj la progresintaj eduk-ideoj. Ili agnoskis ke Dongshahu Lernejo estas unu el la plej bonkvalitaj lernejoj.

*Fonto : <http://www.sipdsh.com/Plus/View.aspx?cid=1216> (tradukita el la Ĉina) ☆*

Se ni kapablas klare vidi la miraklon de unusola floro, nia tuta vivo ŝanĝus.

*Budha*

→ *sekvo de Paĝo 3: Podemos gajnos 5 seĝojn en la hispana Eŭropa baloto.*

"La fertila grundo por la rapida kresko de Podemos estis preparita far la movado 'Indignados', ne la socialistoj", diris Iñigo Errejón, la nova 30-jaraĝa kampanjo-direktoro de la partio. Kvankam la movado estis nekredible disvastigita kaj ne povis esti kaptita en politika partio, li diris : "Mult-nombraj ni ĉeestis, en la placoj kaj en protest-manifestacioj, tiele ni aŭskultis kion diris la homoj kaj faris notojn de ĉio. Sen la ŝanĝoj kiujn alportis la movado en la hispana politika scenejo, Podemos ne estus ebla."

La defio por Podemos nun estas trovi ekvilibron inter popolbaza movado, kies agendo dependas de centojn da laborgrupoj en la tuta lando, kaj funkcia politika partio. Ĝi havas neniun estraron kiu kapablas informi pri tag-al-tagaj decidoj kaj neniun sistemon por respondecigi ĝiajn MEP-ojn. "Ni estas civitana forto, farita el homoj kiuj kuniĝis kaj starigis elektan kampanjon preskaŭ sen mono," diris Errejón.

Laŭ ilia modelo, ili nuntempe celas agi alimaniere ol la aktualaj partioj. "Multaj politikaj partioj ĉiam rigardas ene, neniam ekstere," diris Errejón. "Ni ne volas konstrui nin en tiu sama fermita maniero." Kiel ekzemplo, li indikas la primarajn balotadojn antaŭ la Eŭropaj balotadoj, kiuj estis liberaj al ĉiuj, kiuj deziris partopreni, kaj allogis 33,000 voĉdonantojn.

La venontaj kelkaj monatoj decidus ĉu Podemos povas traduki sian sukceson en aŭtentika ŝanĝo en la hispana politika pejzaĝo kaj subpremi tiujn, kiuj nomas ilin popolan movadon, aŭ movadon nutritan de protest-voĉdonoj.

La fina celo estas pli granda ol nur gajni seĝojn. "Ni ne volas nur partopreni en politika sistemo kiu degeneras. Ne mankas al Hispanujo politikaj partioj. Tio, kio mankas estas civitanoj pretaj engaĝiĝi en politiko. Kaj ni volas, ke nia partio fariĝu ilo por tio."

*La elektitaj reprezentantoj estas :*

- *Pablo Iglesias, instruisto de politika scienco, Universitato Complutense de Madrido (35 jaroj)*
- *Teresa Rodríguez, instruisto de la dua nivelo en Cádiz (32 jaroj)*
- *Carlos Jiménez Villarejo, eksa jura persekutisto kontraŭ koruptado, Barcelono (78 jaroj)*
- *Lola Sánchez, eksa entreprenisto (plialtigo de impostoj detruis ŝian entreprenon), Cartagena (36 jaroj)*
- *Pablo Echenique-Robba, sciencisto ĉe la Hispana Konsilio pri Esplorado (CSIC), Zaragoza (35 jaroj)*

*Fontoj : <http://www.theguardian.com/politics/2014/may/27/podemos-citizen-politics-spain-elections-indignados-movement>  
<http://techpresident.com/news/wegov/25235/how-tech-savvy-podemos-became-one-spain-s-most-popular-parties-100-days>*

*Retpaĝo de Podemos : <http://podemos.info/>*

*Ni estas grupo de novaj esperantistoj, pro tio okazas ke ni eraras Do, se vi trovas erarojn, ni estos dankemaj se vi bonvolus atentigi nin !*